KOMITATKUNSIDO de 18-a de oktobro 2026

Dimanĉon la 18-an de oktobro 2026 kunvenis la komitato de Espéranto-France de la 10a00 ĝis la 17a en la pariza sidejo kaj pere de Zoom.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

PERSONA NOMO	FAMILIA NOMO	MALLONG.	KOMITATANECO	ELEKTO *	ĈEESTAS	SENKULP.	FORESTAS	RAJTIGAS
Raymonde	COQUISART	RC	Repr. de la membraro	23/25		X		MP
Dominique	COUTURIER	DC	Repr. de la membraro	2026			X	
Régis	FABRE	RF	Repr. de la membraro	23/25	R			
Xavier	GODIVIER	XG	Repr. de la membraro	23/25	S			
Aleks	KADAR	AK	Repr. de la membraro	25/26	T/S			
Michaël-Boris	MANDIROLA	MBM	Repr. de la membraro	22/24/26	S			
Sébastien	MONTAGNE	SM	Repr. de la membraro	23/25	S			
Marcelle	PROVOST	MP	Repr. de la membraro	23/25	S			
Bruno	ROBINEAU	BR	Repr. de la membraro	23/25	R			
Viktoro	SIMONNET	VS	Repr. de la membraro	2025	R			
Gilles	TABARD	GT	Repr. de la membraro	2026	S			
Bertrand	VERSTRAETE	BV	Repr. de la membraro	2025		X		XG
Jean-Luc	THIBIAS	JLT	Repr. de fed. France-Est		R			
Pierre	GAUTHIER	PG	Repr. de fed. Paris-Île-de-France		S			
Isabelle	NICOLAS	IN	Repr. de fed. Limousin			X		VS
Xavier	DEWIDEHEM	XD	Repr. de fed. Hauts-de-France		R			
Claude	BENSIMON	CB	Repr. de fed. Bretagne		S			
			Repr. de fed. Poitou-Charentes					
Thierry	SPANJAARD	TS	Repr. de fed. Provence		S			
			Repr. de FET					
Benoît	ENTE	BE	Repr. de FKEA			X		
Didier	JANOT	DJ	Repr. de GEE / ĬLEĬ-Francio		S			
Maureen	Hurstel	MH	Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes		S			

16 ĉeestis el 21, 3 senkulpiĝis, 2 forestas, 3 donis povon
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min
Saïd ĉeestas.

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min
XG prezidas, VS kaj MP kunprotokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj** 5 min

0.4 **Dato de la venonta kunsido** 4 min
Reta kunveno : lundo la 23a de novembro, je la 20a

surloka komitatkunveno : 31a de januaro de la 10a ĝis la 16a
Laborkunsido : 30a januaro je la 14a
Benoît Ente ne estos libera la 31an matene. 4 min.

1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Financo** **DISKUTO** 15 min

Evoluo de la kontotenado, stato de la financoj
Ne aperas en la stokoj kalendaretoj
Rektaj kotizoj al EF malaltiĝis sed pli da interasociaj kotizoj
Kotizoj de JEFO iom malaltiĝis
Malkresko de kostoj de kalendaretoj kaj de budoj en salono.
Ĝeneralaj kostoj de la sidejo ne multe ŝanĝiĝis sed kelkaj aferoj restas farindaj.
Salajro de Said ne multe ŝanĝiĝis. Ni elspezis 3600€ proksimume por la dungo de CB por ĉefredakti la LME.
Pli da mono aldonita en ŝparkonto.
629 membroj aliĝis. 33 pliaj membroj kompare al 2024. Nia asocio do sukcesas kunlabori kun multaj asocioj.
La NK 2026 profitis 3320€ kaj EF ricevis duonon.
Ni povas daŭri investi.
Inventaro jarfina ne plu okazas. La rezulto de la jarfino baziĝas sur tio.
RF ne plu povos daŭrigi kiel kasisto post majo 2027. Du aliaj estraranoj kunlaboras en financa komisiono. SN pretas pli prizorgi kontotenado. Kasisto povos do pli centriĝi pri bilanco, budĝeto.
Propono de MBM : ni serĉu kompetentajn homojn el aliaj asocioj por kandidatiĝi al komitato de Eo France.
Propono de MBM : havi liston de “postenoj” serĉitaj por la venonta komitato.MBM pretas esti en la elekta komision de Eo France.
Propono de AK : havi formale aŭ ne elektan komisionon por serĉi estontajn komitatanojn.
Propono de MP : havu tiun tagorderon (pripensi pri estontaj komitatanoj) por la venonta komitatokunveno dum januaro.

Elekta Komisiono : MBM, MH, GT, RF,

1.2 **Nova aliĝilo 2026-2027** **DISKUTO** 10 min

Informo pri la aliĝ-kampanjo / kaj alvoko al donacoj
Pretis ĝustatempe ĉi jare. Saïd sendis al 331 membroj de 2026 93 kilogramojn da papero kun LME, aliĝilo, kalendareto kaj faldfolio sen prezidanta letero kun aliĝilo al eŭropa kongreso.
Rezulto : 117 jam aliĝis (interalie 42 dumvivaj membroj).
SN sendos al asocioj laŭ petoj pro sendokostojn. *

Pri la kosto de la baza kotizo : 30 eŭroj iras la Eo France, kaj la diferenco inter la tuta kosto kaj 30 estas dividita inter la loka asocio kaj la federacio. Tio videblas en la persona konto de ĉiu membro.
Kiel informi pli bone : Maureen diras ke ene de JEFO oni uzas videon por montri al ĉiuj kiuj bezonas la informon.

1.3 **Rilato kun JEFO**

Mona kontribuo de JEFO al Eo Fance por zorgi pri la funkciado de la sidejo kiu inkluzivas la administrado de la jefo-aliĝoj: trimonate.
JEFO petis rajtojn al Eo France por vidi/kontroli aferojn en Arthur por du pliaj personoj : Ana la kasistino kaj Briac : Maureen rajtas aldoni tiujn personojn
Pri demandoj, eblas sendi mesaĝon al info@esperanto-france.org (pri aliĝoj), informatique@esperanto-france.org (pri komputilaĵoj), estraro@esperanto-france.org (pri ĝeneralaj demandoj) por havi pli grandan ŝancon de respondo.
Ĝisdatigo de la retejo estas planita.

2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Niaj komunikiloj : nova logo, faldfolioj, kalendaretoj** **DISKUTO** 10 min

Ĉu aliaj informiloj por ĝisdatigi: banderoloj, T-ĉemizoj ktp?

- Presi novan ŝildon por la sidejo (impoŝto). Kontakti Bruno Flochon por koni la eksprofesiulo kiu zorgas pri tio
- Eo Francilio : partoprenas la salonon pri matematikaj ludoj. Bezonas havi adaptitan flugfolion por promocii Esperanton rilate kun matematiko aŭ origamio. Necesas ŝablonon por havi facile bela faldfolio.
- Eo Francilio uzas la faldfoliojn por la Homarfesto.
- Ekspozicipaneloj: neniu peto ĝis nun.
- T-ĉemizoj pri la eŭropa kongreso, estos specifaj vendeblaj ĉe la libroservo aŭ antaŭmendebla.
- Ankoraŭ restas kelkaj T-ĉemizoj (kelkaj dekoj) vendotaj antaŭ mendi novajn
- Kalendaretoj legeblaj nur de junuloj kaj interna parto repripensinda.
- Kakemono : 4 ankoraŭ uzeblaj sed ne kun la nova logotipo. Ne urĝo por prepari novajn.

2.2 **Partopreno al Homara festo** **DISKUTO** 10 min

Vilĉjo (Guillaume Demeyer) kunordigis bilancon de lasta partopreno kaj pripenso por la sekva.

- sufiĉe sukcesa kun bela bilanco de Vilĉo (10 deĵorantoj)
- Mankis braceleto. Multaj volontuloj parte partoprenintaj tuttage. .
- la budo ne estis bonelokita. Multa polvo kaj bruo. Pli da venditaj libroj dank' al bankkarta pagilo. Tro rapida fluo da preterpasantoj.

Ni rezignis ĉijare partopreni edukadan salonon.
JEFO proponas havi junulojn por partopreni ĉar multe da junuloj partoprenas la feston. JEFO povas proponi afiŝojn. Proponi havi retaligilon per telefono. Ne utilas disdoni kalendaretojn lasota en rubujo dek metrojn poste sed pli indas pli longe kun homoj.
Ĉu indas partopreni alimaniere la feston : per konferenco, per rondatablo.. Ni devas trovi iun agnoskita de la organizantoj (verkisto, famulo…). Ĉu ni povas kontakti honoraj membroj de Esperanto France ?

Proponoj por la futuro

- kolekti la adresojn/kontaktojn de la vizitantoj,
- informi pri la pubikon pri la staĝoferto aŭ trejnadoferto
- havi specifan dokumenton por tiu publiko do, havi detalojn taŭgaj por tiu publiko
- aĉeti aferon por ricevi monon per karto

Kontakto kun politikaj partioj

- LFI invitis la popolo kontribui la programon (ĉu ni povas inviti ilin meti frazon en la programo kiel la ekologiistoj). SB provis sed ne sukcesis.
- Anfi : somera universitato de LFI. 4 tagoj kun 10 000 homoj partoprenis : multege da junuloj, da paralelaj sesioj, multege da budoj sed ne estis pri Esperanto. SM parolis pri Esperanto kun 3 aŭ 4 homoj.
  Ĉu ni povus partopreni tiun ANFI venontjaro ?Estas grupo "Paix et International" en kiu eble ni povus proponi proponon metota en la libreto.
  1- skribu al ĉiu partio por paroli al la kandidatoj pri Esperanto
  2- kreu laborgrupon de homoj kiuj partoprenas kaj Esperanto-France-n kaj iun partion. Estraro devas sendi mesaĝon al la membroj por inviti ĉiuj labori en tiu kampo aŭ simple informi pri partopreno en iu partio.

Komento de XD : Ni ja klopodu al la politikaj partioj kaj kandidatoj okaze de la venontaj balotoj simile al tio farita de UFE en 2002 (kaj poste?) pere de Claude Longue-Épée. Cetere, ĉu ni plu havas la faritajn leterojn de 2002 (kaj pli poste), cele al inspiro el ili por redakti la novajn?
Ni esploros la temon.

2.3 **Ĉu estonta partopreno en alia salono?** **DISKUTO** 10 min

Ĉar ni rezignis pri salono pri edukado, ni pripensu.
Eblas ankaŭ konsidere kiel nacia partopreno en aliaj regionoj (ol Francilio). En Bretonio, ofta partopreno en *Biozone*.
La fête des possibles okazas ĉiujare en multaj regionoj. BF partoprenis en Nanto (11 sept-11 okt) kaj prezentis Eon dum 45 minutoj.
GT partoprenis per budo en *la fête des solidarités*. Ne ĉie okazas asociaj budoj.
Ni instigu asociojn partopreni kaj estas ebleco helpi ilin.

2.4 **Trejnad-sesioj** **INFORMO** 10 min

Planita reta sesio pri artikolredaktado la 22-a oktobro en Eo. Inviti komitaton, aktivuloj kaj UFE-membroj. Prelegturneo povas okazi kun Dennis Keefe, Alan Neven (el Kroatio) kaj eble kun Bronstein, . Ĉi tiu lasta homo venos en MES marten, do la prelegturneo povas okazi dum Marto. Loka klubo pagas vojaĝkoston al sekva etapo kaj prizorgas surlokan restadon. XD : Bonege pri la eventuala prelegturneo de Bronŝtejn! Certe Norda Francio kandidatos por akcepti lin kaj inkluzivigi sin en la monkontribuan sistemon!

Sesioj kun Dennis Keefe pri “instrui Eon” kaj organizi lingvajn festivalojn. Li lanĉis la festivalo pri lingvoj en Tours antaŭ 30 jaro.

Pierre Dieumegard ankoraŭ pretas prelegi pri la agnosko de edukada akademio kaj la Eo klubo. Por havi nacian agnoskon, ni proponu al aliaj kluboj tiun eblecon.

En Tuluzo, estas Erasmus + kontrakton, ene de tiu kontrakto, povas organizi trejnadon. Lanĉo de kun trejnisto el eŭropa lando. Tio devus okazi antaŭ la 31a de majo kaj dum periodo de du semajnoj maksimume.

2.5 **Sociaj retoj** **DISKUTO** 10 min

bilanco de la hieraŭa kunveno kun lanĉo de laborgrupo pri tiu temo. Ni devas konstati kiuj kompetentas kaj povas tejnigi pri diversaj teknikoj.
Amasaj sociaj retoj kaj alternativaj (bluesky, mastodon).
Mesaĝi pri novaĝoj sufiĉe ofte. Adaptiĝi al modaj tendencoj alikaze viaj mesaĝoj ne estos sufiĉe videblaj.
Kiu estas la celgrupoj: tiuj kiuj jam lernis iomete kaj montri ke Eo vivas kaj povas partopreni kelkajn eventojn.
Gravas ke la homoj kiu publikigas kaj aperas estu pli junuloj ankaŭ ĉar ili konas la farmanierojn. Chloé, eks-volontulo, pretus prizorgi civitajn servojn se ni havus.
Necesus elekti 3 sociajn retojn maksimume por EF respektive JEFO.
Eksplori ilojn kiuj povas adaptigi mesaĝojn al diversaj sociaj retejoj.
Antaŭ kelkaj jaroj, JEFO sponsorigis lingvistikan jutubiston Linguisticae kun ligilo al ikurso. Oni poste konstatis kreskon de nombro da lernantoj. Ĉu denove?
Interese havi kvalitajn fotojn kaj videojn. Havi surloke iun kiu povus fari tiajn.
Estis propono sponsori videojn de La vojaĝo de Lucien Péraire sed MBM diris ke rilatas pli al historio (kiel Nota Bene) sed ne al lingvoj povus interesi historian kanalon kiel Nota Bene.
La venonta kunsido okazos antaŭ la virtuala kongreso de UEA, antaŭ la 26a de novembro.
Labori kun la franclinganoj.

2.6 **Agado kadre de la Eŭropa tago - 9a de majo** **DISKUTO** 10 min

Ideo de EDE kiu pretus helpi per aktivuloj. Dum la somera universitato de EDE, oni diskutis ke estus bone agi.
La projekto estas: kanti la himnon publike en tiu tago kun helpo de EEU. MP diskutas pri tio kun Mikaela Lipari. Por ne esti tro politika, la propono estas ke EF respondecu pri tiu organizado.
Oni konvinku aliajn esperantistojn el multaj landoj el Eŭropo kaj invitu sufiĉe lertajn korusojn por kanti samhore kun sama idealo pri paco per lingvo kiu estus farita por tio. Ni ankaŭ pensu pri eŭropa sento kiun kontraŭas ekstremdekstuloj kiuj aperos en medioj. Eble ne multaj junuloj pretus kanti publike.
La komitato favoras kaj demandas havi pli detalajn proponojn.

3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 ***Le Monde de l’Espéranto*** **DISKUTO** 20 min

Lasta numero. Kio pri la estonteco? Aperis nova numero de nun jara revuo. Venontjare ekzemple temo pri 140 jariĝo de Eo aŭ pri Eŭropo okaze de EEK.
Estas multaj fotoj de maljunuloj kiuj montras aktivecon de diversaj regionoj. Ni povas allogi al enhavoj en sociaj retoj. LME celas montri Eon al ekstera mondo.

MBM Ĉu ni bezonas revuon? Eble ne se mankas homfortoj.
Kataluna E-Asocio (KEA) nun faras unu aŭ du foje jare kun artikoloj pri lingva politiko, gravaj et interesaj kiujn oni povas proponi al bibliotekoj.
FEI havas rubrikon *nova sento* en monata revuo skribita de junulo.

DJ proponis novajn temojn. XD ricevis mesaĝojn kontentigajn post ricevo de la revuo.
TS Mi daŭre opinias ke LME en sia nuna formo utilas. Indas ke nia havu paperaĵojn por disvastigi al homoj kia oni

deziras antaŭeniri pli ol simple disvastigi la flugfolion.
Publiko devas ekzisti inter membroj kaj aliaj.
Tiu ĉi speciala numero ne valoras ĝenerale.
JEFO povas kontribui skribante pri iu temo eble ne pri junula agado.

AK Serioze ni povus peti kongolandan aktivulon ĉefredakti LME. Joel Muhire faras tre bonan laboron pri la Konga Stelo. Efektive LME povus esti iuspeca jara almanako kiu kunigus la artikolojn aperintajn en E Aktiv (Okazas + artikolo + kalendaro).
Tio malaltigus la salajran koston.

3.2 **Esperanto Aktiv** **INFORMO** 5 min

- Venonta numero sept/oktobro

Intervjuo de Floreal Martorell et Vinilkosmo
Deko da artikoloj pri forumoj de asocioj en Francio

- Venontaj planoj :

Intervjui la nova prezidanto de Akademio
Serge Sire ankaŭ respondis pozitive al intervjuo

Por la venonta numero : planitaj serio da artikoloj pri Zamenhofaj Festoj en Francio

3.3 **Aliaj Kongresoj** **INFORMO** 10 min

- EsperOri komenciĝos post 5 tagoj. Eblas partopreni rete.
- UK 2027. Informo pri antaŭ kaj postkongreso. Unua aliĝperiodo ĝis fino de novembro. uk.esperanto.net

3.4 **Kongresoj 2027, 2028 kaj 2029** **DISKUTO** 40 min

Eŭropa kongreso 2027 en Carry-le-Rouet apud Marseille. EEK2027 aliĝilo aperos marde, rete kaj papere (A5 faldite). 1000 ekzempleroj senditaj al Ĉerizejo. Limo de la hotelo: 100 ĉambroj. Plej multaj ĉambroj kun du malgrandaj aŭ unu grandan liton kaj 2 litoj unu super alia en la enirejo.
Ideo estas aliĝi kun pakaĵoj.
Mesaĝo al EF pri ĉiuj asocioj pri bezonoj. SN skribu pri libroservo.
Parteneroj: EAB, EEU, FEI, Valona Esperanto Asocio, GEA
Vespere estos spektakloj kun proponoj ĉefe de lokuloj, ekskursoj piede kaj buse.
Oni povas proponi prelegojn 20', 50', 90'.
Ekzistas Telegram-grupo por interŝanĝi: t.me/europakongreso2027
T-ĉemizoj estos proponataj je 15€ antaŭ la kongreso kaj estos pli multe kostaj poste (ekzemple dum la kongreso)
Prezo por junuloj kaj B-landanoj havos duonan rabato.

Aliĝilo / helpo al junuloj kaj junulara programo (Verdaj skoltoj kaj liceanoj (8) de Salins la Bains kaj gepatroj)
Fragejo povas subvencii ekde 4 noktoj ankaŭ por vojaĝkostoj.
Infanoj malpli ol 15 jaraj loĝantaj kun gepatroj ne pagas. Eblas ankaŭ unŭhomaj ĉambroj sufiĉe multe kostaj.
Homoj povas ankaŭ partopreni laŭ taga prezo.

Kongreso 2028 organizota de Norda Federacio.
Xavier **ne** konfirmis ke la norda federacio zorgos pri la postjara kongreso, ni do plu diskutu kaj esploru la temon.
Raymonde restas la kontaktrespondeculino.

Kongreso 2029 : liston de eblaj kongresejoj en la Francilia Regiono ricevos RC

3.5 **Projekto Cartolingo** **INFORMO** 5 min

La projekto en kiu UFE estas partnero kun CNRS ricevis aprobon por financado de DIM PAMIR

Tiu projekto rilatas katalogigon de bibliotekoj kiujn entenas librojn kaj aliajn dokumentojn en minoritataj lingvoj kiel Esperanto. https://www.pamir.fr/

3.6 **Peto de subvencio por Afrika kongreso** **DECIDO** 5 min

La peto celas helpi **10** afrikajn junulojn partopreni al la 9a afrika kongreso ekde 26-a ĝis la 31-a de decembro. La partoprenkosto kiu inkluzivas vojaĝon kaj restadon estas 200€. Restas mono en la konto rezervo por afrika agado. Propono je duono de la buĝeto do 1000€. La tuta buĝeto estas ĉirkaŭ 15000€. SN kontrolis spezdokumentojn de Adjévi. Mono kelkfoje malaperis dum UK Tanzanio, pro tio ni estas prudentaj sed ni konas tiun kiu petis Adjevi laj la financoj estas kontrolita de UEA. La esperanta movado en Afriko venas el franclingvanoj, pro tiu historio ni ofte subtenas la afrikan Esperanto-movadon. Peti raporteton pri helpitaj partoprenantoj.
1 sindeteno, 0 kontraŭ, 5 rete aprobis, 13 surloke + 3 rajtigiloj aprobis

3.7 **Virtuala kongreso**
VK 2026 (https://vk.esperanto.net/2026/) : limdato por aliĝi estas la 15a de novembro, por la programo : gis la 18a de oktobro. Demando estas ke ĉiuj kiuj povas donacu por tiu kongreso por havi monon por disvastigi la rezulton. Estas la 7a VK. Ĉu Espéranto France partoprenos la virtualan movadan foiron prezentante la Eŭropan Kongreson kaj la agadliston. La lasta jara VK okazis pri Discord, ĉi jare normale per Zoom. AK aŭ XG aligas UFE al Virtuala Movada Foiro kaj ni decidos poste kion prezenti.

4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj.)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 5 min

Pri KER: Niveloj B1, B2, C1 kaj C2

Pri FEI :

4.2 Eldonoj **INFORMO** 5 min

Pri la eldonoj: nuntempe estas 3 projektoj survoje.

1. Anti-grammaire de l'espéranto, verkita de Kris Keyser.

Dum somero, mi finis la enpaĝigadon kaj aldonis diversajn ilutraĵojn. Claude Besimon kaj mi kontrollegis, kaj poste Kris skribis sian opinion pri la korektoj. Pro sanaj kialoj, ŝi malfacile povos antaŭeniri, sed tuj post kiam ŝi finos korekti, mi povos fini la enpaĝigadon.
Jen PDF kun la kovrilpaĝo kaj kelkaj enaj paĝoj:
https://drive.google.com/file/d/17j5e5nTjbsjzVBt4IrVewiFPIxqIvVeA/view?usp=sharing

2. Metodo 12

La sekcio pri kontrolado de lernolibroj de la Akademio de Esperanto finis la laboron en junio.
La akademianoj notis kelkaj erarojn kaj konsilis kelkajn plibonigaĵojn.
Mi tamen ankoraŭ ne korektis la en engaĝigadon ĉar plu mankas 8 desegnoj de Robin (7 ĉapitroj kaj la koverto). Antaŭ 2 semajnoj, li respondis, ke li ne forgesis la projektoj sed pro diversaj kialoj, li ne rapide antaŭeniris, sed promesis ke post meze de oktobro, li havos pli klaran ideon pri kiam li povos fini la laboron.
Jen la PDF kun la tekstoj kaj desegnoj de la 5 unuaj ĉapitroj kun liaj desegnoj;
https://drive.google.com/file/d/1UlAZ12jvBRK2RuBV-hLA1clu_vcYLBKp/view?usp=sharing

Flanke de Emmanuelle Richard restas iom da laboro:
- enpaĝigi la tutan enhavon korektitan de la akademianoj
- trovi fotojn por la paĝoj "Lernu pliajn vortojn". En la nuna eldono, tiuj paĝoj, titolitaj "kompletigaj lecionoj", estas fine de la libro kun eta desegnojn enhavanta multajn detalojn por paroligi la lernantojn. En la nova eldono, ni decidis meti ĉiun kompletigan lecionon post la koncernata leciono. Kaj anstataŭ desegnon, ni decidis uzi diversajn fotojn por ilustri la vortoprovizon.

Pri Metodo11: ni ricevis kejkajn farendajn korektojn. Mi jam korektis la dosieron (InDesign). Do kiam estos tempo presi novan stokon de la libro, mi rapide povos prepari la PDF-on.

3. La verkoj de André Cherpillod

Kiel vi eble scias, en aprilo, André Cherpillod donis al Esperanto-France la rajton eldoni ĉiujn librojn, kiujn li memeldonis ĝis tiam. Entute estas ĉ. 200 libroj, en Esperanto kaj / aŭ en la franca.
Ni kaptos la okazon por plimodernigi la aspekton kaj uzi metodojn por faciligi la disvendandon. La libroj

estos presitaj laŭ mendo, kiel ni nun kutime faras, kaj estos ĉifereca eldono (EPUB).